



**MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"**

**INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: RAMÓN DE SALAS**

**Administracio kaj Redakcio: Str. RODA, n.º 14-16**

## Ĉiam ekzistos poezi'

Gustavo Adolfo Bécquer

Ne diru, ke la liro eksilentis,  
Ĉar temoj elĉerpigis jam por ĝi.  
Poetoj eble mankas nun, sed ĉiam  
Ekzistos poezi'.

Dum l'eterondojn pro efiko luma  
Vidigos rava hel',  
Dum per koloroj nubojn sun' la brila  
Ornamos en ĉiel',  
Dum en l'aer' ŝvebos dolĉe milde  
Parfum' kaj harmoni'.  
Dum en la mond' printempo foje regos,  
Ekzistos poezi'.

Dum la scienc' ne scios, kie estas  
De l' vivo la fontan',  
Kaj en ĉiel' aŭ mar' abismon provos  
Mezuri ĝi en van',  
Dum la homar' antaŭen ĉiam iros  
Sen vivoĉela sci',  
Dum por la hom' mistero estos ie.  
Ekzistos poezi'.

Dum ni eksentos, ke l' anim' gajiĝas  
Sen rido ĉe la buŝ',  
Dum ni malĝojos sen la sento tamen  
Je varma larmotuŝ',  
Dum batalados nia kap' kaj koro  
Laŭ daŭra kolizi',  
Dum dolĉmemoroj kaj esperoj estos,  
Ekzistos poezi'.

Dum virokuloj sur okulojn inajn  
Bildigos dum rigar',  
Dum sopirantaj lipoj amrespondos  
Sopirojn de lippar,  
Dum du animoj povos kunfandiĝi  
Per kiso de pasi',  
Dum en la mond' virino bela estos,  
Ekzistos poezi'.

El la hispana tradukis,

RAMÓN DE SALAS.

## EL « KIHOTO »

(Daŭrigo)

Iun tagon, kiam mi iris sur la Komerca strato el Toledo, knabo venis al silkisto por vendi al li kelkajn kajerojn kaj malnovajn paperojn. Ĉar mi amas legi eĉ la disŝiritajn paperojn, kiuj kuŝas sur la strato, pelate de tiu ĉi mia natura emo mi prenis unu el tiuj kajeroj, kiujn la knabo vendis, kaj rimarkis, ke ĝia skribado estas araba. Malgraŭ tiu konstato, ne sciante arablingvon, mi iradis serĉeme, ĉu iu hispanujana maŭrido, povanta legi la kajeron, okaze preterpasas.

Ne estis malfacile trovi tian interpretiston kaj ankaŭ oni havus ĝin eĉ por alia pli bona kaj antikva lingvo. La sorto fine sendis al mi unu, kiu koninte mian deziron, kaj ricevinte en siajn manojn la libron, malfermis ĝin tra la mezo kaj iom leginte li ekridis. Mi demandis, kial li ridas, kaj li respondis, ke pro rimarka skribaĵo en paĝrando de la libro. Mi petis, ke li sciigu min pri ĝi, kaj ne ĉesante ridi, li aldonis: Kiel mi diris, estas tie ĉi skribita sur la paĝrando: "Tiu ĉi Dulcineo de Toboso", tiel multfoje citita en tiu ĉi historio, havis—tion oni diras—por pekli porkojn pli lertan manon, ol ĉiu ajn virino el la tuta Manĉo. Aŭdinte diri: "Dulcinea de Toboso", mi restis surprize kaj mire, ĉar tuj mi imagis al mi, ke tiuj kajeroj enhavas la historion de don Kihoto. Kun tia penso mi igis la maŭridon rapidi al la lego de la komenco kaj ĝin farinte, li jene tradukis el la arablingvo: "*Historio de don Kihoto de la Manĉo, verkita de Cide Hamete Benemgeli, araba historiisto*". Multe da diskreteco mi bezonis por lertkaŝi la ĝojon, kiun mi eksentis aŭdante la titolon de la libro, kaj eltiregante el la manoj de la silkisto ĉiujn paperojn kaj kajerojn mi aĉetis ilin de la knabo per duonrealo: tamen, se li estus estinta diskreta kaj sciinta kiom multe mi ilin deziras, li estus al si promesinta kaj ricevinta per la aĉeto pli, ol ses realoj. El tie mi tuj apartiĝis kun la maŭrido kaj kondukis lin en la ĉirkaŭgalerion de la ĉefpreĝejo, kie mi petis, ke li redonu al mi hispane tradukitaj, ĉiujn kajerojn, kiuj pritrak-

tas la historion de don Kihoto, nenion aldonante, nek forigante, laŭ kiu ajn prezo, de li mem fiksita. Li kontentiĝis per kvindek funtoj da sekvinberoj kaj du buŝeloj da greno kaj promesis ilin traduki bone, fidele kaj tre rapide. Por faciligi la aferon kaj ne ellasi tian bonan trovajon, mi gastigis lin ĉe mi kaj li tradukis dum iom pli ol monato kaj duono la tutan historion, same kiel tie ĉi estas raportate. En la unua kajero oni tre laŭnature pentris la duelon de don Kihoto kaj la Vasko. Ambaŭ staris en la sama sinteno raportita de la historio: kun levitaj glavoj, unu ŝirmita de la rondŝildo, la alia de la kapkuseo. La mulino de la Vasko estis tiel vive pentrita, ke ĝi montriĝis esti lubesto eĉ tiel malproksime, kiel pafarko atingas. Sub la piedoj de la Vasko estis almetita titolo diranta: “*Don Sanĉo de Azpeitia*”, sendube lia nomo, kaj sub la piedoj de Rocinanto alia diranta: “*Don Kihoto*”. Rocinanto estis mirinde pentrita, tiel longa kaj streĉita, tiel maldika kaj malgrasa, kun tia granda spino kaj deklarita ftizo, ke ĝi plej malkaŝe montris, kiel observeme kaj ĝustece oni almetis al ĝi la nomon Rocinanton. Apud ĝi staris Sanĉo Panza, kiu tenis je la kolbrido sian azenon, ĉe kies piedoj alia titolo diris: “*Sanĉo Zancas*”. Sendube li havis, kiel la pentraĵo montris, dikan ventron, mallongan talion kaj longajn kruojn. Tial oni kredeble nomis lin “Panza” aŭ “Zancas”, ĉar ambaŭvorte la historio lin alnomas. Kelkaj aliaj malgrandaj detaloj estis rimarkeblaj, sed ĉiuj estis sengravaj kaj ne ĝuste trafas la veran raportadon de tiu ĉi historio kaj el la veraj neniuj estas malbona. Se al la vereco de ĉi tiu oni povas meti refutaĵon, tio nur estas, ke ĝia aŭtoro estis arabo kaj al liaj samrasanoj nature okazas esti mensogemaj, sed pro ilia malamikeco al ni, oni povas kredi pli pri nesufiĉo, ol pri troigo. Tion mi pensas, ĉar kiam li povus kaj devus longe skribi por laŭdado de tiel bona kavaliro, li ŝajnas artifice silenti. Jen afero malbonfarita kaj plimalbonpensita, ĉar historiistoj devas esti ĝustaj, veraj kaj neniel pasiemaj, ĉar ne profito, nek timo, nek venĝemo aŭ ŝato devas ilin deflankigi de la vojo al vero, kies patrino estas historio, konkurantino de tempo, tenejo de homfaroj, atestantino de estintaĵo, ekzemplo kaj avizo de estantaĵo kaj averto de estontaĵo. En tiu ĉi historio mi scias, ke oni ĉion trovos, kion oni povus deziri en la plej milda, kaj se io bona mankus al ĝi estus pli kulpa, miaopinie, ĝia hunda aŭtoro, ol la pritraktata afero. Fine, ĝia dua parto, laŭ la traduko, jene komenciĝis:

(*Daŭrigota*).

## «NIA GAZETO»

Ĉi tiu esperanto-gazeto, eldonata en Francujo, kies formato estas 43'5 × 31'5 centimetra, konsistas el multaj paĝoj ilustritaj per belaj fotografajoj kaj estas redaktata de profesiaj gazetistoj nome: Georges Avril, S. Grenkamp-Kornfeld, Julio Baghy ktp., kies nomoj estas ja tre multe konataj en Esperantujo kaj garantias la bonstilon kaj altan intereson de la enhavo.

La abonejo en Hispanujo por ĉi tiu tre grava, ĉiumonata gazeto estas “Aragona Esperanto-Federacio”—strato Roda 14-16, Zaragoza—, do ĉiuj hispanoj dezirantaj ĝin aboni faru la abonpeton pere de ĝi.

Jarabono por hispanoj: 12 fr. fk.

## Gramatikaj Interpretoj

Nia lingvo nuntempe same, kiel antaŭe, nur havas, kiel devigaj, esencaj aferoj, krom la eternaj principoj de logiko, la 16 regulojn de la Fundamento kaj la oficialan radikaron de la Akademio. Ĉio cetera povas esti pli-malpli klara, ofte uzata, preciza, bela aŭ oportuna kaj sekve pli-malpli rekomendinda kaj imitinda, sed neniel deviga nek laŭ aŭ kontraŭ la esenco de Esperanto, ĉar la esenco de Esperanto nur konsistas el la trio Fundamento, Logiko kaj Oficiala Radikaro.

Se ni havus almenaŭ oficialan gramatikon sufiĉe detalan kaj zorge faritan por la de ĉiuj sama interpretado kaj ĉiukaza aplikado je la Fundamento laŭ principoj de logiko, kaj samtempe oficialan vortaron kun ĝusta kaj preciza difino esperantlingva je ĉiuj oficialaj radikoj, ni ne bezonus cerbumi tiel ofte kaj ni povus esti certaj pri tio, ĉu ni bone aŭ nebone uzas la lingvon. Dume ni kontentiĝu per la helpo de libroj kiel Kompleta Gramatiko kaj Vortfarado de Grenkamp-Kornfeld, Plena Gramatiko de Esperanto de Kalocsay-Waringhien, Plena Vortaro de S. A. T. kaj aliaj similaj, kiuj ja estas tre bonaj kaj meritplenaj, sed finfine neoficialaj kaj sekve nedevigaj, ĉar iliaj interpretoj estas privataj kaj foje eĉ eble malsamaj.

### Neesprimata subjekto.

La paragrafo 123-a de Kompleta Gramatiko de Grenkamp-Kornfeld diras jene:

“123. Kiam subjekto estas la sama por ĉiuj verboj en la frazo, tiam oni povas esprimi ĝin nur antaŭ la unua verbo:

Mi miras, timas, tremas (Haml. I. I.).

Li alkuris, ekkaptis la infanon kaj tiris ĝin el la danĝero”.

Per ĉi tiuj ekzemploj kaj per atenta ekzameno je la klasika esperanto-literaturo oni rimarkas, ke tiu permeso ne meti la subjekton, kiam ĝi estas tiu sama de antaŭa propozicio de la frazo, nur estas uzata kutime, kiam la propozicioj de la frazo ne interrilatas reciproke, kiel ĉefa kaj dependa. Kaj mi sincere miras, miregas pro ĉi tiu sencela kaj memvola limigo por apliki regulon, kiu estas tiel logika, simpla, klara kaj utila, ĉar ĝi ebligas malpezigi frazojn, permesante ne ripeti tede la saman subjekton, do elegantigi la stilon.

Ekzemple:

Li venas, ĉar deziras ripozi  
 Ŝi plendas, kiam parolas kun li  
 Vi vidas, ke bezonas labori  
 Oni estas gaja, se estas sana.

Oni ne diru, ke estas eble logika rezono por tio, ĉar ĝuste laŭ logika vidpunkto estas pli intima la rilato inter ĉefa kaj dependa propozicioj, ol inter nur rilatantaj propozicioj, tial ke dependa propozicio estas ja membro de ĉefa (subjekto aŭ komplemento de subjekto aŭ de predikato). Tio neniam okazas ĉe la aliaj propozicioj, kaj nedubeble pli multe da rilato ekzistas inter kapo, korpo kaj membroj de individuo, ol inter du individuoj eĉ tre intime rilatantaj.

Krom tio estas instinkta afero ĉe manko de subjekto en propozicio, pensi pri tiu de la ĵus dirita

kaj rilatanta propozicio, eĉ kiam oni ne estas alku-  
timiginta al tio, tute same, kiel en la frazo:

Mia amiko havas hundon. Mi hieraŭ vidis la  
hundon (la ĵus diritan hundon) kaj vokis ĝin (la  
saman hundon).

Oni divenas tuj, pri kiu hundo temas, kvankam  
artikolo *la* kaj pronomo *ĝin* neprecize difinas.

Do kial oni nepre metas subjekton en depen-  
dan propozicion, kvazaŭ ĝi ne estus tuj divenbla,  
kaj en la ceteraj kazoj ne?

Oni estas puŝata pensi, por respondi tion ĉi, pri  
naciismoj, pri kutimoj ĉe naciaj lingvoj.

Tamen en esperanto oni tute ne estas devigata  
imiti tiajn kutimojn, se la Fundamento ne trudas  
ilin nek logiko ilin rekomendas. Kontraŭe logiko  
diras, ke, ĉar la paragrafo 123-a estas aplikata fakte  
en kelkaj kazoj, tute samrajte oni apliku ĝin  
aŭ tute simple ĉiam, kiam oni volos, ĉar absolute  
neniam venas malklareco nek dubeblaĵo pro tio kaj  
tre ofte rezultas per ĝi pli malpeza, mallonga kaj  
bonstila frazo. Do konklude ĝi estas rekomendinda  
regulo por ĉiuj kazoj.

### Vortdisigo de linio al linio.

Vortdisigon oni povas fari en esperanto laŭ du  
malsamaj manieroj, nome:

Laŭ nepre libera maniero, nur atentante papers-  
pacon (La plej oportuna por skribi aŭ komposti;  
rekomendita de Zamenhof).

Laŭ silaba disigo (La plej klara).

(Vidu paragrafon 269 de Kompleta Gramatiko  
de Grenkamp-Kornfeld).

En ĉi tiu lasta sistemo oni bezonas atenti la ra-  
dikojn kaj afiksojn de la vorto, por ke la disigo  
estu nepre, ĉu inter silaboj de radiko, ĉu inter ra-  
dikoj, afiksoj, aŭ radikoj kaj afiksoj. Sekve same  
por skribado, kiel por kompostado, ĝia daŭra apli-  
ko estas iom maloportuna kaj la plia klareco atingata  
tute superflua, ĉar por kunmetitaj vortoj ne-  
disigitaj estas neniu signo, por apartigi la erojn  
ĝin konsistigantaj, kaj spite tion oni komprenas  
ilin bonege, do kial okaze de disigo laŭ linioj estas  
necesa plia distingilo, ol ordinare?

Kelkaj partianoj de la dua sistemo montriĝas,  
malgraŭ tio ke ĝi estas, nek fundamenta, nek ofi-  
ciala, nek entute pli utila, ol la unua, sufiĉe trude-  
maj kaj kritikaj kvazaŭ ĝi estus eraro aŭ nescio,  
la laŭbezonan disigon rekomenditan de Zamenhof.

Almenaŭ ili devus kompreni, ke oni estas libera  
por uzi la sistemon, kiu pli multe plaĉas ĉiun, ĉar,  
kiel mi jam diris, neniu el ili estas devigaj.

RAMÓN DE SALAS.

## Opinioj pri Sango kaj Sablo

El *Heroldo de Esperanto*.

Unu el la plej belaj kaj instruaj romanoj de la  
mondfama hispana verkisto V. Blasco Ibáñez, es-  
tas nun tradukita de nia kara samideano, Prof. Ra-  
món de Salas y Bonal. La traduko estas bonstila,  
kaj per ĝi ne perdas la stilo de la aŭtoro hispana.  
La laboro de s-ro Salas estas duoble aplaŭdinda,  
pro la malfacila tasko venkita de la tradukado de  
l'diversaj taŭr-artaj terminoj, kiuj ne ĉiam havas  
tradukon en la diversaj vortaroj.

"Sango kaj sablo" estas la ununura tradukita  
verko de la fama aŭtoro en Esperanto, kaj plenigas

per vera fiereco nin hispandevenantojn, vidi plej  
klaran pruvon de la taŭgeco de nia kara lingvo:  
sekve la traduko ankaŭ tial estas aplaŭdinda, ĉar  
per ĝi la tradukinto konigas al la mondo juvelon  
de la hispana literaturo, kiel pruvido ankaŭ de pa-  
triotismo.

Ni kore gratulas s-ron de Salas pro tiu ĉi eldo-  
najo kaj ni kore lin dankas pro lia kontribuo al  
la pliriĉigo de nia literaturo, kaj ni same kore de-  
ziras, ke lia laboro trovu multajn imitantojn.

LUIS E. SEPÚLVEDA CUADRA.

Santiago de Chile.

## A V I S O

Se hace saber a los señores socios que tienen pe-  
dido se les reserve lotería de Navidad, que ésta  
sólo se podrá reservar hasta el 30 del corriente  
noviembre.

### RAPORTO PRI VOJAĜO al 27<sup>a</sup> UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

(Daŭrigo)

La tagon 4an. Aŭg. matene la kongresanoj ve-  
turis per du specialaj vagonaroj al Romo, la tag-  
manĝo estis en restoracivagonoj kaj je la 3a. post-  
tagmeze ni estis en Romo. Tiu urbo estas ekstran-  
ga miksaĵo de modernaĵoj kaj antikvaĵoj. Ĝia Vojo  
de l' Imperio estas stratego, en kies randoj staras  
modernaj monumentoj de blankega marbro apud  
disfalantaj restaĵoj el la antikvaj forumoj; en ĝia  
ekstremajo ankoraŭ staras fiere duonruinigita la  
Koloseo, kiu estas amfiteatro de la antikva Romo,  
kie okazadis spektaklo konsistanta el bataloj inter  
homoj, kaj de homoj kontraŭ krueleĝaj bestoj an-  
kaŭ estis tiea spektaklo la mortigado de kristanaj  
martiroj jetitaj al kruelestoj. En Romo ni pasi-  
gis 4 tagojn. Inter la tieaj vidindaĵoj estas interes-  
plena la Sankta Urbo "Vatikano", kiu estas sen-  
dependa ŝtato en la urbo Romo. Ĝi estas la teri-  
torio de la Papo, kiu estas la religia estro de la  
romakatolikaj kristanoj. Ne parolante pri ĝia flan-  
ko religia ankaŭ estas interesa tiu urbo de la arta  
vidpunkto. La placo Sankta Petro havas, ĉe sia  
fundo, grandegan preĝejon, kaj impona kolonaro  
kurbe ĉirkaŭas la placon; en la Vatikano estas  
grandaj muzeoj enhavantaj belegajn valorajn pen-  
traĵojn kaj skulptaĵojn, ankaŭ estas vidindaj ka-  
peloj kaj ĝardenoj. Ĉar ofte oni ŝanĝis la progra-  
mon, multaj kongresanoj ne povis partopreni kun-  
sidojn, prezentadojn kaj paroladojn. Eĉ la mal-  
fermo, kiu ĉiam estas la plej soleña kunveno el  
ĉiu kongreso, estis nunjare malmulte ĉeestata. Do  
multaj kongresanoj decidis nur ĝui vojaĝon kaj ne  
ĝeni sin por la kongreso. La internacia balo okazis  
en kazino apudmara en la banloko Ostia. Mia ed-  
zino kaj mi forlasis tiun lokon je la fino de la festo  
per la lasta vagonaro al Romo je la 3a. nokte.  
Versajne ni trafis liton ĉirkaŭ la 4'30a. matene.

La tagon 8an. la kongreso iris al Napoli per du  
specialaj vagonaroj. Ĉi tiu sud-Itala urbo havas  
belan, modernan kvartalon, sed facile oni trovas  
malpurajn stratojn trakuritajn de nudaj infanoj

kaj duonnudaj malsataj geknaboj. La popolo en Napoli estas babilema kaj mensogema, en luksa vendejo oni ne hontas peti kvinoblan prezon pri iu varo, kiun oni vendus je taŭga prezo, se oni diskutadus sufiĉe lerte; sed... Napoli havas apud si belegajn vizitindajn lokojn... Capri... la Vesubo, Pompei, Sorrento... La kongreso vizitis la ruinojn de la elfosita urbo Pompei. Estas nepriskribebbla emocio, kiun oni sentas rigardante tiun detruitan urbon. Oni povas facile kompreni tion, kio estis la vivmaniero de ĝiaj loĝantoj, kiam neatendita pluvo de vulkana cindro enterigis la tutan urbon kaj loĝantaron. Verŝajne Pompei estis, luksa somerurbo, kie la tiamaj feliĉuloj havis tre komfortajn loĝejojn, tie estas videblaj teatroj kaj vendejoj, banejoj kaj preĝejoj, ĉio disfalinta, sed tre bone konservita de la vulkanpolvo. Eĉ murpen-trajoj estas freskoloraj ankoraŭ. Neforgesibla tragedio de Pompei...

(Daŭrigota).

## SPRITAJOJ

Iu sinjoro alvenis en fervojan stacidomon ŝvitigante; nur dek minutoj mankis por la ekiro de la vagonaro. Feliĉe ankoraŭ estis sufiĉe da tempo; sed, kiam li proksimiĝis por aĉeti la bileton, li rimarkis, ke estas forgesinta la monujon. Tiam li diris korpemate al la valizportisto de la hotelo:

—Kuru kaj vidu, ĉu mi lasis en mia ĉambro mian monujon. Sed rapidegu. En kvin minutoj vi povos iri kaj reveni... Se mi ne povos vojaĝi en ĉi tiu vagonaro, tio estos por mi terura malutilo. Mi donos al vi dek pesetojn rekompence.

La knabo malaperis kvazaŭ fulmo. Forpasis tri, kvar, kvin minutoj. La sinjoro moviĝis malpacience, parolis kun si mem...

Fine, kiam nur mankis unu minuto kaj duono por la ekiro, aperis lacega la knabo.

—Jes, sinjoro, mi vidis—diris li spiregante—la monujo efektive estas sur la tablo.

\* \* \*

Grafo S. iris la pasintan jaron en Afrikon por ĉasi leonojn. En amika rondo li rakontas siajn aventurojn:

—Foje mi renkontis leonon. Ĉar mi tiam ne portis iun ajn armilon, mi uzis heroan rimedon: mi sidiĝis kaj rigardis ĝin fikse.

—Kaj kio okazis?

—Mi sukcesegis. La leono eĉ ne moviĝis por min tuŝi.

—Estas strange. Kial tio okazis?

—Mi tute ne scias... Kelkajn fojojn mi pensas, ĉu tio okazis, ĉar mi sidiĝis sur tre altan branĉon de arbo.

## SALUTOJN

Finfine en Alcoy rondeto de esperantistoj fondis esperantan societeton. Ĝi estas nomata "Nova Vivo" kaj jam, de la unua de Novembro, komenciĝis kurso de Esperanto.

Tiuj, kiuj apartenas al la grupo, salutas fervore ĉiujn societojn, grupojn kaj esperantistojn de nia lando. Ankaŭ nia saluto transpasu niajn landlimojn alvenonte ĉe la koron de niaj eksterlandaj samideanoj.

La grupo "Nova Vivo" do, malfermos siajn por-

dojn al tiuj, kiuj pensas alte kaj sentas supere, ĉar ili estas la unuaj aferoj, kiujn bezonas ĉiu persono volanta lerni Esperanton.

Nia grupadreso estas: Strato Fermín Galán, 189 bis.—Alcoy.

Ĝi estas fondita laŭ regularo aprobita de la provincestro.

## Dankinda Letero

Alcoy la 29-an de Oktobro de 1935.

Tre alte estimata Sro. Ramón de Salas.

La komitato de la grupo "Nova Vivo", ĵusa societeto fondita laŭ registara leĝo, salutas vin emocie, ĉar ni ĉiuj, anoj konsistigantaj la grupon, admiras vian belan kaj trafan agadon por Esperanto. Ĉi tiun agadon ni modeste penos imiti en Alcoy, antaŭenirante "sub la sankta signo de la Espero".

Nia grupo salutas kore la kuraĝan societeton "Fratego", nia pliĝa frato, dezirante kunan amikecon kaj sinceran interkompreniĝon.

Premante viajn manojn, restas via, de "Fratego" kaj de nia kara lingvo.

**La komitato**

Je kiu nomo mi skribas

PEDRO VAQUÉ.

\* \* \*

Niavice korege ni dankas la vortojn de la komitato de "Nova Vivo" kaj deziras al tiu esperanto-societeto longan, sukcesan kaj prosperan vivon.

## Utiloj kaj malutiloj de la edzeco

Edzineco ofte estas por la virinoj la nura vojo, kiu prezentigas al ili por la atingo je siaj ambicioj; nur por artistinoj teatraj kaj kinematografaj aŭ por tiuj, kiuj vivadas per iu ajn alia profesio dependanta de la publiko, foje estas edzineco baro, ĉar tiam la edzo devos okupi neĉefan lokon, almenaŭ, se li ne havas la saman profesion kaj ne estas sur ne malpli alta, belarta ŝtupo laŭ la publika opinio kaj tio tre ofte naskas hejmajn malpacojn. Ĉiukaze artistino devas ne edziniĝi kun viro dudekjara, kiu eble post kvin jaroj fariĝos baro por ŝi. La samaj reguloj aplikataj al la ambiciaj viroj regas por la virinoj, kies profesioj dependas de la publiko.

Ambicia virino estas ekscitilo, kiu puŝas la viron eĉ pli malbone dotitan al la aferoj plej mirindaj. Estas politikuloj, ŝtatestoj, scienculoj kaj multe da altpostenaj viroj, kiuj ŝuldas siajn sukcesojn al la inteligento de siaj edzinoj. Kaj al la menso tuj al-kuras la sama demando, kiun oni povus fari antaŭ veturilo, pri tio ĉu du ĉevaloj tiras ĝin pli bone, ol unu sola. Efektive ili povas tion fari, se ili estas bone unuigitaj, se ili estas same fortaj kaj se ili alportas la ŝarĝon per sama kontento. Sed, se unu el la ĉevaloj estas juna, fajrsanga, trenema kaj forta, dum ĝia kunulo kontraŭe estas malalta aŭ malforta kaj volas iri laŭ alia vojo aŭ restadi kvieta, la veturilo, kompreneble, ne antaŭeniros tiel rapide, tiel senriske, kiel se estus jungita nur la juna kaj fajreca ĉevalo.

JOSE M. CODERQUE.

El la rondeto «Fratego».

Atēca (Zaragoza).